

Literatura Mondo, 10-a parto:
Kontraŭ literatura fak-vortaro, Rezolucio de la Japana Esperanto-Kongreso,
respondoj, silento de Kolomano Kalocsay
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 636, 1975.12.17 & 20

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Post la jaroj 1930, paralele al la disvastiĝo de la esperanta belestro, esprimiĝis ĉiam pli akra kontraŭstaro, fare de la neliteraturema esperantistaro, al la ekzisto mem de literatura fako kaj de la neologismoj, kiuj ĝin karakterizis. En 1933 tiu kontraŭstaro konkretiĝis en *Rezolucio por vere Internacia Esperanto*, kiun unuanime akceptos la 21-a Japana Esperanto-Kongreso la 3-an de novembro. Ni citas erojn el ĝi:

A.- « *La esenco de la lingvo mem kuŝas en ĝia manifestado, kiu realiĝas ĉefe per la literaturo ; konsekvence fako speciale nomata **literatura** en Esperanto ne povas ekzisti kaj oni ne povas formi ian fakan vortaron literaturan, kiel ekzemple, maŝinfakan, medicinan, aŭ alian terminaron. Tion ĉi ni asertas spite de la sofismoj de anoj de la tiel nomata **literatura fako**. Neologismoj pro bezono de poemfabrikado estas nenio alia ol la degenerado de la arto poezia ; plie, en Esperanto ĝi signifas rekte danĝeran ludon kontraŭ la **Fundamento**. [...]* »

Cl.- La organo **Lingvo – Libro**, bibliografia kaj recenza suplemento al *Literatura Mondo*, en la unua numero de 1934, post la publikigo de tiu japana rezolucio, diskonigas respondojn. Ĝi unue citas la respondon aperintan en la decembra numero de **La Pirato** de Raymond Schwartz : Jen resume la pirata vidpunkto :

A.- « *La neologisma demando neniam ekscitis min. – Se iu ĉielproksima poeto, ŝvebante du mil futojn super la realaĵo de l' terpomkampoj, nepre deziras susuri al anĝeloj, muzoj kaj kompanio la nedifineblajn sentojn de sia labirinta animo, nu bone, li elektu – se necese, eĉ kreu – por tiu ĉi celo taŭgan esprimilon. Kial tio ĝenus min ? Nur tiam mi protestus, se iu aŭtoritato pretendus devigi min partopreni tian stelregionan konversacion. Aliflanke mi bone scias, ke multaj vortoj, utilaj kaj necesaj, ankoraŭ mankas al ni; ke en ĉiuj lingvoj la poezia radikaro estas pli riĉa, pli altnivela ol la populara. Kial Esperanto ne trairus similajn evolufazojn, kiel naciaj lingvoj kaj kial ni ne lasus al kompetentaj literaturistoj la malagrablan taskon elekti mem siajn laborilojn ? – Mi ripetas, ke neniu devigas vin traŝviti la tutan **Inferon** de Kalocsay. Do kial vi plendas ? Kaj, sincere, kiom da Esperantistoj kutimas legi Esperantajn verkojn ? La granda armeo, kies ĉefa tasko estas nur aldoni kelkajn nulojn al statistikaj ciferoj, povas senemocie kovri sian literaturbezono per legado de prospektoj kaj gvidfolioj kaj kontentigi sian artosoifon dum la balvespero de la grupo **Verda Stelo**. [...]* »

Cl.- Tiu ĉi respondo de Raymond Schwartz respegulas la socian konflikton, kiu ekzistis en la jaro 1930 inter la esperanta popolo kaj ties elito. La popolo, tio estas la granda plimulto de la eternaj komencantoj, de la poresperantaj propagandistoj kaj de la grupgvidantoj ofte ne tre kleraj, ne agnoskis la ekzistorajton de esperanta klerularo, de kies aktiveco tamen dependis la progreso de la lingvo. Tiu ĉi konflikto ne komplete malaperis. En multaj landoj ĉiam ekzistas profunda fosaĵo inter la esperantistaro kaj la esperanta klerularo. Sed tiuj ĉi du tavoloj da esperanto-praktikantoj ĉesis konflikti, kontraŭe al tio, kio okazis, kiam la revuo **Literatura Mondo** ekvapis la verkemon de la beletristoj.

A.- La redakcio de **Literatura Mondo**, per la plumo de **G. Karczag**, alportis oficialan reagon sub la titolo **Doma respondo**. Jen citaĵo :

Cl.- « Ĉar la supra rezolucio [...] direktiĝas propre kontraŭ **Literatura Mondo** kaj kontraŭ Kalocsay [...] mi kredis, ke Kalocsay mem respondos al la rezolucio. Sed li preferas silenti. Kiam mi intervjuis lin pri la afero, li ŝultrotiris : « Hm. Oni povas diskuti kun unu homo, kun kelkaj homoj, sed – kun amaso ? Amaso ja havas nerefuteblan argumenton : voĉon, kian voĉon, kiu subpremas la parolon de la kompatinda diskutanto. Mi ne emas superkriegi amason. Poste, mi laciĝis por plu argumenti. Miajn argumentojn oni nomis **sofismoj**. Jen la ĉiopova amas-argumento. Mi imagas, kiel krias centoj kaj centoj : « sofismoj, sofismoj ! » Kion mi povus fari kontraŭ ili eĉ per la plej trafa rezonado, per brila ekzemplo. Ili ne aŭdus tion pro sia propra voĉo. Kaj vane mi starus sur miaj dektri libroj: ili ne atingas la alton de multe pli facile ĉarpentebla popoloratora estrado. Ilin, plejparte tradukojn de ĉefverkoj, kiuj postulis de mi kvazaŭ asketan memkoncentrigon dum multaj jaroj, oni simple nomis **degenerado de la arto poezia**. Donacon mi volis doni al la esperantistaro, kaj jen, ties grava parto ofiale kaj **unuanime** kraĉis sur ĝin. Mi estas profunde konvinkiĝinta, ke tiu laboro, kiun mi faris kaj volis fari, ne estas ebla sen vortara pliriĉiĝo. Neniu eĉ provis min serioze, argumento kontraŭ argumento, konvinki pri la kontraŭo. Tiom malpli oni provis min konvinki per ekzemploj, farante same malfacilan, same aŭdace entreprenitan, same ampleksan laboron kiel mi. Mi, kompatinda praktikulo, batalis kun teoriuloj feliĉaj. Volonte. Diskutojn mi ĉiam amis. Sed nun oni ekscitis laŭtkrian ĥoron, por ke ĝi sufoku mian voĉon, tondrante: Sofisto, degeneriganto, modernulo, **poeto**, vort-imperialisto ! Kaj eĥos ĉiuj gazetoj, aplaŭdos societoj. Oni jam parolas pri bajkoto. Mi ŝtopas la orelojn kaj rifuĝas. »

A.- Ekde nun eĉ la revuo **Literatura Mondo** ne plu ricevos poemojn de la fama poeto sen popolo. Ombra periodo en nia movada historio !

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!